# Boletín

*Nº 350 marto/aprilo 2001*




Kunveni - kunvivi

*Asociación de utilidad pública*

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

# Boletín

## BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

**Aperanta de 1949**

Redaktisto: Miguel Gutiérrez Adúriz; Los Coteros 1-C, 2-I; ES-39600 Muriedas; Cantabria; liven@nexo.es

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la respektivaj aŭtoroj. La redaktisto rajtas rifuzi ne petitajn artikolojn.*

**Hispana Esperanto-Federacio**

**Rodríguez San Pedro 13, 3°, 7; ES-28015 Madrid;**
**Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79**
**Konto ĉe BBVA (Caja Postal): 0182-2552-61-0204011.961**
**admin@esperanto-es.org**
**www.esperanto-es.org**


**Estraro**
**Prezidanto: Miguel A. Sancho.**
**Vicprezidanto: José M. Galofré.**
**Sekretario: Manuel Parra.**
**Kasisto: Pedro Garrote.**
**Vicsekretario: Marcos Cruz.**
**Voĉdonantoj:**
**Luis Hernández,**
**Augusto Casquero,**
**Miguel Gutiérrez.**

## Enhavo

Okaze de la 350a *(A. Marco)* . . . 2
Grava alvoko . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Donacoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Libroserva jarbilanco . . . . . . . . 5
Ĝenerala Kunsido de HEF . . . . 5
Jarraporto de HEF . . . . . . . . . . . 6
Jarbilanco de HEF . . . . . . . . . . . 8
Karavano al 86 UK . . . . . . . . . . 9
Niaj Grupoj kaj Asocioj . . . . . . 12
Valencia-Murcia Kongreso . . . 16
Projekto Semo . . . . . . . . . . . . . 17
Estrarkunsido . . . . . . . . . . . . . 17
UNESKO-premio al ERA . . . . 17
Ĉirkaŭ la mondo . . . . . . . . . . . 18
60a Hispana E-Kongreso . . . . 21
Triopa utilo de Esperanto *(Haszpra Ottó)* . . . . . . . . . . . . 22
Olafo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 23
Forpasis . . . . . . . . . . . . . . . . . . 24
Astronomio . . . . . . . . . . . . . . . 25
Du recenzoj *(J. Camacho)* . . . 26
Expolingua 2001 . . . . . . . . . . . 28
Memmortigo . . . . . . . . . . . . . . . 28
Muziko . . . . . . . . . . . . . . . . . . 29
Lingva angulo *(A. Valén)* . . . . 30
60a HEK, loĝado . . . . . . . . . . . 31
60a HEK, aliĝilo . . . . . . . . . . . . 32
Hispana Literaturo . . . . . . . . . k-d

# Okaze de la 350a numero de "Boletín"

Neniu hispana samideano sentos sin surprizita se ni asertas, ke la organo de HEF, "Boletín", estas la plej valora kaj ŝatata perlo de la hispana esperantistaro. Ne, ne povas ekzisti surprizo, ĉar tio estas tro evidenta en la realo de antaŭ pli ol duonjarcento, oni do ne bezonas serĉi ajnan pretekston por komenti la historion aŭ gravecon de nia bulteno, tamen, kiam kunekzistas preteksto, oportuneco kaj bezono, ni tion faras tre plezure. Tiel estas nun okaze de la 350a numero de la organo de HEF.


BOLETIN
Núm. 1

"Boletín", naskiĝis en monato januaro de 1949 post longa atendado de la koncerna permeso fare de la tiamaj aŭtoritatuloj, kiam la politika pejzaĵo tute ne favoris la esprimoliberon kaj ĉiu signo de kulturo estis suspekteme rigardata, do ĉia nomo devis esti kiel eble malplej bombasta, se eble eĉ "neperceptebla".

Komence, ĝi aperis kiel ĉiumonata bulteno, simila formato kiel la nuna, okpaĝa kaj nuda de ĉia ornamo, eĉ sen la normala kovrilo. Ĝi nur pretendis, informi la HEF-anaron pri Esperanto kaj taŭgi kiel interna ligilo de ĉiuj hispanaj esperantistoj, multaj el ili anonime perditaj sur la taŭrofelo de la iberia geografio.

La unua ĉefredaktoro estis Luis Hernández Lahuerta, valenciano, lerta presisto, elokventa oratoro, kunfondinto de HEF, bona verkisto kaj kun longa historio kiel elstara laborista esperantisto. Li posedis la magion por transformi simplan vorton en muzikan sonon. Li estis bildo kaj realo de tiu homa estaĵo nomata poeto. Kiam, post dekjara ekzisto de nia Federacio, oni volis ekzalti la centan numeron de nia bulteno, la plej elstaraj esperantistoj de la mondo sendis emociigajn laŭdojn kaj gratulojn por nia modesta gazeto kaj... kompreneble, ankaŭ por la redaktoro: la artikoloj kaj gratuloj venis de Ivo Lapenna, Giorgio Canuto, W. Auld, Teruo Mikami, F. Szilaghyi, Paul Thorsen, Régulo Pérez, Reto Rossetti, F. Azorín, F.R. Banham, Dalmau, Carolfi, Fdez. Menéndez k.a. Estis la ĝusta rekono al la fajna kvalito kaj bona laboro farita de nia redaktoro, kies idealismo ebligis lin superi sin mem kaj ĉiajn barojn. Kaj kredu min, ili estis nek malmultaj nek facilaj!

Post plurjara restado kiel redaktoro, s-ro Hernández Lahuerta lasis la postenon pro ekmalsanoj, kaj aliaj redaktoroj venis anstataŭi lin, sed la bona vojo jam estis farita.

Kiel ofte okazas al multaj asocioj, ankaŭ nia Federacio suferis krizajn tagojn, kaj en tiuj tempoj "Boletín" restis kiel la sola vivoelmontro de nia ekzisto kaj garantio de nia estonto, ĝis novaj homoj kun renovigitaj energioj kaj talento puŝis antaŭen nian aferon.

La celebrado de la 200a numero de "Boletín" koincidis kun la arĝenta jubileo de nia organo fine de 1973. Tiam oni komencis eliri el la nigra tunelo de la diktaturo, kaj la esprimolibero ridetis ĉe la horizonto, tio ja signifis la eblon esprimi certajn ideojn kaj opiniojn krom la apero de aliaj kulturaj revuoj. Kiel teoria redaktorino rolis, ekde 1962, s-ino Inés Gastón, kiu elektis du faktajn redaktorojn. Unua estis samideano López Escartín, inteligenta homo kiu metis ordon kaj koheron en la enhavo de nia revuo; poste venis Fernando de Diego, kiu donis al nia gazeto, ne nur riĉan kaj varian enhavon, sed ankaŭ altan nivelon beletran: li starigis kiel apriorajn fakojn en ĉiu numero tri temojn: informado, beletro kaj liriko.

Pri informado, li aperigis, krom la ordinaraj novaĵoj, artikolon verkitan de li mem titolitan "Revuo de la Revuoj". Temis pri angulo tute simila al tiuj memorindaj iam subskribitaj de la "Legema koboldeto" (pseŭdonimo de Hernández Lahuerta), konsistanta el eltiraĵo de saĝaj konkludoj



el la plej interesaj artikoloj aperintaj en la plej prestiĝaj esperantistaj revuoj de la tuta mondo. En ĉiu numero aperis ankaŭ poemoj de la plej elstaraj hispanaj beletristoj, kiujn li majstre tradukis, al kiuj aldoniĝis artikoloj kaj poemoj de bonaj kunlaborantoj, ofte prestiĝaj eksterlandanoj.

Fernando de Diego donis majstran lecionon pri tio kiel redakti interesan esperantistan revuon. "Boletín" vivis zenitajn jarojn!

Denove venis krizaj jaroj por la Federacio dum kiuj eĉ "Boletín" mem suferis malatenton kaj dekadencon, precipe pro manko de regula financado, sed iom post iom oni superis tiujn malaltajn horojn kaj en 1991, okaze de la 300a numero de nia bulteno, oni povis rigardi normaligita la situacion. Kaj kiel diris en tiu ĵus menciita numero nia eminenta amiko Salvador Gumá: "Ni konstatas plezure ke nia "Boletín" atingis sian 300an numeron: la vojo estis malglata post la intercivitana hispana milito, kiu dividis nian landon, ekziligis multajn samideanojn kaj okazigis multajn enterigojn... "Cent semoj perdiĝas..."sed la

**Kovrilo**

Tria Esperanto-Renkontiĝo en Hervás (Cáceres) de la 24a ĝis la 26a de februaro 2001.

## Grave!

La kongresanoj de la 60a Hispana E-Kongreso devos elekti la Estraron de Hispana E-Federacio por la venontaj kvar jaroj. Tial, pere de ĉi komunikaĵo, oni invitas la membrojn prezenti siajn eventualajn proponojn de kandidatiĝo al la Sekretario de la Asocio.

Miguel Ángel Sancho, Prezidanto

bela sonĝo de l' Homaro ĝermis el la cindro kiel nova Fenikso".

En la komenco de nova jarmilo "Boletín" atingas sian 350an numeron. Antaŭ niaj okuloj paradas la enorma revolucia eksplodo de la interkomunikiloj, precipe de la informadiko, kiu minacas invadi ĉion: la mondo, nia mondo malgrandiĝas, korpremas la globigo de nova socio; ĉe la horizonto aperas la eblo de mirinda virtuala vivo, eble tre interesa sed ne humana kaj reala. La idealoj malaperas ĉar ĉio eblas per la fikcio kreita de la informadika teknologio...

Kiel influos la esperantistan idealon, la vivon kaj evoluon de nia Federacio, tiuj novaj elementoj?

Ĝis nun HEF jam uzas, prave, Interreton por la propagando de esperanto, kaj tio signifas salti la landlimajn barojn kaj eĉ la kontinentojn, sed kie situas "Boletín" en tiu nova mondo? Ĉu estonte ĝi estos nur unu el tiuj retsidejaj (wed) paĝoj, kiuj eĉ nia Federacio mem uzas nun? Ĉu ni povos disvastigi kaj eĉ starigi la ideon de lingvo internacia, konkrete de esperanto, en tiu fikcia vivo kreita ĉe laboratorioj?

La pluekzisto de nia bulteno en nia proksima estonto, estas la defio kiun ni havas antaŭ ni kiam aperas la 350a numero de nia bulteno!

Mi, malnova idealisto, ne apartenanta al ia ajn skolo, sed konservanta ĉiam fiere idearon pri mondo pli progresema kaj justa, deziras al nia "Boletín" la plejan bonon en ĉiuj aspektoj!

*Antonio Marco Botella*



## Donacoj

| | | |
|---|---|---|
| 23-05-00 | Angelita Sanz | 650 |
| 03-01-01 | José Mª Bernabéu | 1.006 |
| 05-01-01 | Antonio Rez. Gasch | 674 |
| 09-01-01 | Pablo Vicente | 174 |
| 11-01-01 | Josep Ferrer | 3.400 |
| 15-01-01 | Miguel Ángel Sancho | 948 |
| 17-01-01 | José Sardá | 1.672 |
| 22-01-01 | Félix Calvo | 674 |
| 30-01-01 | Félix Sánchez | 107 |
| 07-02-01 | Francisco Ramírez | 106 |

**Uzu por viaj donacoj al HEF**

**La bonan konton ĉe BBVA**

**0182-2552-61-0204011.961**

## Libroservo: Resumen de Ingresos y gastos 2000

| Ingresos | |
|---|---|
| Anterior | 43.270 |
| Venta de libros | 711.636 |
| Total ingresos | 754.906 |

| Gastos | |
|---|---|
| Compra de libros | 435.124 |
| Trasporte de libros | 13.616 |
| Material de oficina | 24.670 |
| Tasas apartado | 3.125 |
| Registros giro | 2.970 |
| Sellos | 45.678 |
| Catálogo | 36.550 |
| Gastos bancarios | 8.087 |
| Devolución reenbolso | 575 |
| Teléfono | 971 |
| Otros | 1.100 |
| Comisiones | 6.518 |
| Total gastos | 578.954 |
| Saldo | 175.952 |

Luis Hernández

Valladolid 31 dic. 2000

## Alvoko al Ordinara

## Ĝenerala Kunsido

Konforme al nia statuto, la HEF-prezidando alvokas ĉiujn membrojn al la Ordinara Ĝenerala kunsido okazonta en Centro Cívico de San Javier kadre de la 60a Hispana Kongreso, la 24an de junio 2001, je la 11a horo, por pritrakti jenan tagordon:

1. Lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido (San Sebantián de los Reyes, 1a de majo 2000).

2. Lego kaj eventuala aprobo de la dokumentoj prezentendaj al la Ministrejo de Enlandaj Aferoj, inkluzivante kontoetatojn kaj agadraporton. (Resumo de ili troviĝas en apudaj paĝoj, ĉi-numere.)

3. Ĉu okazigi nian venontjaran asembleon en Verona, Italio? (Vidu Btín-348, paĝo 18)

4. La prezidanto raportas pri la agado de Fundación Esperanto.

5. Elekto de nova estraro por la periodo 2001-2005 (la sekretario atendas kandidatiĝojn).

6. Demandoj, petoj, proponoj.

# Resumo de la jarraporto pri aktivaĵoj 2000

## Aktivaĵoj ĉefe en rilato al la membroj

1. Oficejo

1.1. Administrado de kotizoj kaj servoj. Perado de kotizoj por UEA.

2. Eldonaĵoj

2.1. Boletín

3. Kongresoj

3.1. Hispana Esperanto-Kongreso. San Sebastián de los Reyes (Madrido) de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo.

3.2. Partopreno de HEF en la UK, okazinta en Tel-Aviv, pere de la komitatano-A Luis E. Hernández García. (De la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto).

## Aktivaĵoj por la publiko ĝenerale

1. Kursoj

1.1. Perkoresponda kurso (ses novaj kursanoj en 2000)

1.2. Prunto de la HEF-ejo al MEL por okazigo de ĉeesta kurso. (De oktobro ĝis decembro, kun ses lernantoj, gvidite de Juan del Castillo)

2. Kunlaboro kun oficialaj instancoj kaj privatuloj

2.1. Hispana Komitato por kunlaboro kun UNESKO. Regula sendado de nia jarraporto pri aktivaĵoj.

2.2. Valencia Universitato. Esperanto-kurso en la Filologia Fakultato gvidita de A. Casquero, kun oficiala valoro de du kreditoj. (De la 13a ĝis la 30a de aprilo).

2.3. Autonoma Barcelona Universitato.Esperanto-kurso organizita de Kultura Asocio Esperantista, kun oficiala valoro de tri kreditoj. (De la 19a de oktobro ĝis la 9a de decembro).

2.4. Casa de la Moneda de Segovia. Traduko en esperanton de inform-triptikon pri ĝia historio.

2.5. Wide Angle Productions. Registrado de raporto pri esperanto por la video-kolekto "¿Qué hay?", didaktike celanta la lernadon de la hispana lingvo.

2.6. Laboratorios Iberhome. Traduko en esperanton de tekstoj de Buñuel, decembre publikigitaj en la revuo "Lumen Aphotecariorum" eldonata de tiu laboratorio.

2.7. Studentoj. HEF kunlaboras regule kun studentoj kiuj bezonas informon pri la lingvo aŭ la esperanta movado por plenumi siajn akademiajn taskojn.

3. Disvastigo

3.1. Expolingua. De la 6a ĝis la 9a de aprilo. duafoja partopreno de HEF en ĉi-tiu foiro. Cele al diskonigo de la lingvo, oni realigis jenajn aktivaĵojn: distribuado de pli ol 1000 triptikajn ekzemplerojn, distribuado de ĉirkaŭ 1200 ludo-testajn ekzemplerojn, ĉiutaga lotumo de perkoresponda kurso, ekspoziciado de libroj, revuoj, diskoj, ktp., konsultebleco de la HEF-paĝoj, spektado de la video-kurso "Mazi en Gondolando", inform-distribuado pri esperanto kaj HEF (cirkaŭ 3000 diversaj ekzempleroj).

3.2. Salamanka Universitato. Prelego pri la lingvo fare de Jorge Camacho. Oni lotis 5 lernolibrojn inter tiuj, kiuj korekte solvis la ludo-teston, disdonita post la prelego. Januare.

3.3. Kultura Centro "Maestro Alonso". Prelego pri esperanto fare de Manolo Parra, sekretario de HEF. Maje.

3.4. Sistema distribuado de la Manifesto de Prago.

3.5. Daŭra distribuado de la broŝuro Pro-Esperanto inter amaskomunikiloj kaj interesiĝantoj.

4. Donacoj

4.1. HEF donacas al la Salamanka Universitato, al la Madrida Aŭtoma Universitato kaj al la Madrida Politeknika Universitato jenajn librojn: Esperanto. Curso del idioma internacional de Miguel G. Adúriz. Parolu E-on de José F. Arroyo. Pro esperanto de A. Alonso. ABC de la Eŭropa Unio de Rafaela Urueña. Sur la spuroj de Federico García Lorca de Miguel Fernández. Sanga Nupto de Federico G. Lorca, tradukita de M.Fernández. La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha de M. de Cervantes, tradukita de Fernando de Diego.Historia del esperanto en Madrid Lupe Sanz Bueno. El esperanto: fenómeno de la comunicación de William Auld.

Memoru
la adreson de nia
ret-sidejo
www.esperanto-es.net

5. Amaskomunikiloj

5.1. Regule HEF, pere de M. Pancorbo, sendas komunikojn al ĉefaj ĵurnaloj kaj novaĵagentejoj pri la ĉefaj okazintaĵoj en rilato kun esperanto.

5.2. Intervjuoj al pluraj membroj de HEF en amaskomunikiloj.

6. Internet

6.1. HEF disponas informpaĝojn en interreto pri esperanto, la Federacio, kaj ties aktivaĵoj.

7. Libroservo

8. Perado de revuoj

8.1. HEF peras la revuojn Eventoj, Kontakto kaj Esperanto.

9. Biblioteko

10. Aliaj aktivaĵoj

10.1. Kampanjo 2000.

10.2. Akademio de Esperanto. Unu el la membroj de HEF, Jorge Camacho, estas akademiano.

## Balance de Situación

## Federacion Española de Esperanto

Condiciones: importes en pesetas y periodos 2000 y 1999.

| ACTIVO | EJERCICIO 00 | EJERCICIO 99 |
|---|---|---|
| B) INMOVILIZADO | 10.663.886 | 10.809.896 |
| II. Inmovilizaciones inmateriales | 127.884 | 0 |
| 5. Aplicaciones informáticas | 127.884 | 0 |
| 215. APLICACIONES INFORMATICAS | 127.884 | 0 |
| III. Inmovilizaciones materiales | 10.536.002 | 10.809.896 |
| 1. Terrenos y construcciones | 10.000.000 | 10.000.000 |
| 221. CONSTRUCCIONES (OFICINA CEN.) | 10.000.000 | 10.000.000 |
| 3. Otras instalaciones, utillaje y mobiliario | 1.050.268 | 1.033.912 |
| 225. MOBILIARIO | 358.134 | 358.134 |
| 226. ORDENADORES, FAX, ETC. | 692.134 | 675.778 |
| 4. Anticipos e inmovilizaciones materiales en curso | 292.984 | 292.984 |
| 232. BIBLIOTECA | 292.984 | 292.984 |
| 7. Amortizaciones | -807.250 | -517.000 |
| 282. AMORT. ACUM. INMO. MATERIAL | 807.250 | -517.000 |
| | | |
| D) ACTIVO CIRCULANTE | 2.145.952 | 1.907.478 |
| II. Existencias | 441.075 | 456.687 |
| 1. Comerciales | 441.075 | 456.687 |
| 300. LIBROS PARA VENDER | 441.075 | 456.687 |
| III. Deudores | 472.555 | 343.519 |
| 4. Deudores varios | 472.555 | 343.519 |
| 440. DEUDORES | 10.000 | 10.000 |
| 447. PATROCINAD. AFILIADOS Y OTROS | -7.536 | 34.650 |
| 553. CUENTA EN UEA Y LIBROSERVO | 470.091 | 298.869 |
| VI. Tesoreria | 1.163.227 | 736.874 |
| 570. CAJA PESETAS | 125.480 | 74.635 |
| 572. BBVA | 1.037.747 | 662.239 |
| VII. Ajustes por periodificación | 69.095 | 370.398 |
| 480. GASTOS PAGADOS ANTICIPADAMENTE | 69.095 | 370.398 |
| | | |
| TOTAL ACTIVO | 12.809.838 | 12.717.374 |

| PASIVO | EJERCICIO 00 | EJERCICIO 99 |
|---|---|---|
| A) FONDOS PROPIOS | 12.299.350 | 12.373.987 |
| I. Capital suscrito | 12.373.987 | 12.854.788 |
| 101. FONDO SOCIAL | 12.373.987 | 12.854.788 |
| VI. Pérdidas y ganancias (Beneficio o Pérdida) | -74.637 | -480.801 |
| 129. PERDIDAS Y GANANCIAS | -74.637 | -480.801 |
| E) ACREEDORES A CORTO PLAZO | 510.488 | 343.387 |
| IV. Acreedores comerciales | 410.086 | 251.924 |
| 2. Deudas por compras o prestaciones de servicios | 410.086 | 251.924 |
| 400. PROVEEDORES | 0 | 144.000 |
| 419. ACREEDORES (UEA,UK,) | 410.086 | 107.924 |
| VII. Ajustes por periodificación | 100.402 | 91.463 |
| 485. CUOTAS COBRADAS POR ANTICIPADO | 100.402 | 91.463 |
| TOTAL PASIVO | 12.809.838 | 12.717.374 |

# Karavano al la 86a UK

*Grupo Esperanto de Valencia* organizas karavanon al la 86a Universala Kongreso okazonta de la 21a ĝis la 28a de julio en Zagrebo (Kroatio). Ekzistas du eblecoj, nome:

1.- Veturi aviadile: Ekiro el Valencia la 20an de Julio. Alveno en Valencia la 29an. Prezo aviadilo + loĝado en Zagreb: pli, malpli 90.000 pesetoj.

2.- Veturi aŭtobuse: Ekiro el Valencia la 19a de julio. Alveno en Valencia la 31an. Prezo aŭtobuso + loĝado survoje kaj en Zagreb: pli, malpli 80.000 (eblas viziti interalie Venezion kaj aliajn interesajn lokojn survoje kaj en Kroatio). Minimume: 25 vojaĝantoj.

La fina prezo dependas de la nobro de aliĝantoj. Tiuj kiuj deziras veturi aviadile devas tuj mendi, ĉar la prezo estas speciala oferto al grupo, kaj tiaj favorprezaj aviadilbiletoj rapide elĉerpiĝas. Se iu povos varbi kunvojaĝantojn (amikoj, familianoj, ktp), pli rapide oni povos finorganizi ĉion, kaj plej malmultekoste estos por ni ĉiuj.

## Cuenta de perdidas y ganancias

Condiciones: Importes en Pesetas, periodos 2000 y 1999


| DEBE | EJERCICIO 00 | EJERCICIO 99 |
|---|---|---|
| A) GASTOS | 2.065.149 | 2.005.955 |
| A2. Compras | 35.612 | 66.191 |
| Compras de libros | 35.612 | 66.191 |
| 600. COMPRAS DE LIBROS | 20.000 | 333.957 |
| 610. VARIA. EXISTEN. DE MERCADERIAS | 15.612 | -267.766 |
| A4. Dotaciones para amort. de inmovilizado | 290.250 | 258.500 |
| 682. AMORT. DEL INMOV. MATERIAL | 290.250 | 258.500 |
| A6. Otros gastos de explotación | 1.739.287 | 1.599.194 |
| a) Servicios exteriores | 1.651.630 | 1.596.769 |
| 622. REPARACIONES Y CONSERVACION | 19.710 | 3.330 |
| 623. SERVICIOS DE PROF. INDEPEND. | 116.000 | 0 |
| 625. PRIMAS DE SEGUROS | 17.530 | 8.334 |
| 626. COMISIONES BANCARIAS | 46.632 | 40.279 |
| 627. PUBLICID., PROPAG. Y EXPOLINGUA | 841.937 | 971.460 |
| 628. SUMINISTROS (luz, telefono, Internet, etc) | 238.536 | 223.856 |
| 629. OTROS SERV. (UEA, Comun. Correo, etc) | 371.285 | 349.510 |
| c) Otros gastos de gestión corriente | 87.657 | 2.425 |
| 655. Cuotas devueltas por el banco | 87.657 | 2.425 |
| AII. RESULTADOS FINANCIEROS POSITIVOS | 0 | 91 |
| AIII. BENEFIC. DE LAS ACTIV. ORDINARIAS | 0 | 0 |
| A13. Gastos extraordinarios | 0 | 49.900 |
| 6780. GASTOS POR INTRODUCCION DEL EURO | 0 | 49.900 |
| AIV. RESULT. EXTRAORDIN. POSITIVOS | 18.042 | 0 |
| AV. BENEFICIOS ANTES DE IMPUESTOS | 0 | 0 |
| A15. Impuesto sobre sociedades | 0 | 32.170 |
| 630. IMPUESTO SOBRE BENEFICIOS | 0 | 32.170 |

| HABER | EJERCICIO 00 | EJERCICIO 99 |
|---|---|---|
| B) INGRESOS (B1 a B13) | 1.990.512 | 1.525.154 |
| B1. Importe neto de la cifra de negocios | 1.781.770 | 1.515.063 |
| a ) Ventas | 243.454 | 143.752 |
| 700. VENTAS DE LIBROS | 243.454 | 143.752 |
| b) Prestaciones de servicios | 1.538.316 | 1.371.311 |
| 705. PRESTACIONES DE SERVICIOS | 48.943 | 126.337 |
| 720. CUOTAS DE USUARIOS | 38.972 | 30.740 |
| 721. CUOTAS DE AFILIADOS | 1.280.923 | 1.150.028 |
| 723. INGRESOS COLABOR./CONGRESOS | 81.392 | 0 |
| 726. DONACIONES DE SOCIOS | 88.086 | 64.206 |
| B4. Otros ingresos de explotación | 190.700 | 10.000 |
| a) Ingresos accesorios y otros de gestión corriente | 10.700 | 10.000 |
| 759. INGRESOS POR SERVICIOS DIVERSOS | 10.700 | 10.000 |
| b) Subvenciones | 180.000 | 0 |
| 741. OTRAS SUBVENC. A LA EXPLOTACION | 180.000 | 0 |
| | | |
| BI. PERDIDAS DE EXPLOTACION | 92.679 | 398.822 |
| B7. Otros intereses o ingresos asimilados | 0 | 91 |
| c) Otros intereses | 0 | 91 |
| 7690. INGR. POR REDONDEO EURO | 0 | 91 |
| | | |
| BIII. PERDIDAS DE LAS ACTIV. ORDINARIAS | 92.679 | 398.731 |
| B12. Ingresos extraordinarios | 18.042 | 0 |
| 778. INGRE. EXTRA. (DEVOL. IMPUESTOS) | 18.042 | 0 |
| | | |
| BIV. RESULTADOS EXTRAORD. NEGATIVOS | 0 | 49.900 |
| | | |
| BV. PERDIDAS ANTES DE IMPUESTOS | 74.637 | 448.631 |
| | | |
| BVI. RESULTADOS DEL EJERC. (PERDIDAS) | 74.637 | 480.801 |

# Niaj Grupoj kaj Asocioj

## Asturio

La 3a "Feria de las lenguas" (Lingvofoiro) okazis en Gijón de la 13a ĝis la 16a de marto kun la partopreno de Astura E-Asocio (pliaj informoj en la venonta numero).



## Ekstremaduro

* Daŭre viglas la agado en ĉi komunumo kie okazas oficiala E-kurso por instruistoj patronita de CPR (Centro de Profesores y Recursos) de Don Benito-Villanueva de la Serena. La kurso, gvidata de José María Salguero, daŭros 42 horojn de marto ĝis majo. Jen oportuna aranĝo por semi inter la homoj kiuj poste instruos en mezlernejoj de la regiono (Vidu foton supre).

* Alia elmontro de la agado en Ekstremaduro estas la Tria Esperanto Rekontiĝo kiu, organizita de liberecana organizaĵo Fundación de Estudios Sociales Extremeños Pío Sopena, okazis de la 24a ĝis la 26a de februaro en la montara vilaĝo, juda heredaĵo, El Pinajarro de Hervás (Cáceres). 18 partoprenantoj el la regiono, kune kun alvenintoj el Salamanko kaj Madrido, ne nur laboris organizitaj en tri malsimilaj niveloj, sed ankaŭ babilis kaj ekskurzis en la bela ĉirkaŭaĵo. (Vidu la foton de la kovrilo).

*M. Zocato*

## Eŭskio

* La 12an de februaro, iom antaŭ la anoncita dato, komenciĝis ĉe la Vaska Universitato la oficila kurso "Lenguas planificadas: Esperanto". La horaro estas: lunde de la 15:00 ĝis la 16:30 kaj merkrede de la 16:30 ĝis la 18:00. Aliĝis 24 homoj. La plejmulto estas virinoj. En la kurso oni uzas ankaŭ Interreton por prezenti al la ler-

nantaro, estontaj instruistoj, klaran internacian bildon de Esperanto.

*J.M. García Iturrioz*

* La eŭska traduko de la libro "El la vivo de bervala sentaŭgulo" (Bervalen gertatuak") originale verkita en Esperanto fare de Louis Beaucaire, estis prezentita en Vitorio-Gasteizo la 17an de januaro. Prelegis la tradukisto, Aitor Arana, kaj la konata vitoria esperantisto Xaier Rico.

* Radio Economía el Mungia intervjuis samideanon Jesús M. García. Dum duonhoro la aŭskultantoj povis ekkoni la historion de Esperanto, ĝia nuna disvolviĝo en la regiono kaj la diversaj avantaĝoj de la lingvo en internaciaj kontaktoj.

*El "Nia ponto"*

# Kanariaj Insuloj

* La 8an de februaro, la radiostacio Radio Isla FM, aŭskultebla en prekaŭ la tuta insulo Tenerife kaj en la nordo de Granda Kanario, intervjuis dum 20 minutoj la Prezidantinon de Societo ESTO, s-inon Ana Rosa Pitti kaj alian membron de la asocio, kadre de la programo "La enciclopedia de la vida".

*Omar Rajan*

* Eldonitaj de ESTO aperis lastatempe du interesaj kajeroj. La unua estas 20-paĝa kaj proponas la hispanlingvan prelegon "Santa Cruz de la Palma kaj Esperanto", prezentitan de Leandro Trujillo okaze de la 2a Kanaria Renkontiĝo. La dua verko estas 32-paĝa kaj proponas falsimilon de hispanlingva prelego foje farita de Juan Régulo "Necesidad hitórica y valor literario del Esperanto" (Historia bezono kaj literaturo valoro de Esperanto).

* Komenciĝis la kurso pri Esperanto en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de la Laguna. Pri ĝi ni amplekse informos en la venonta numero de Boletín.



# Kantabrio

En Luey, vilaĝo situanta en la okcidenta parto de Kantabrio okazis du inicaj E-kursoj. La unua kurso celis grupon el 7 infanoj kaj dua celis grupon el 6 plenkreskuloj. Ĉiu klaso daŭris unu horon ĉiumarde dum februaro kaj marto.

*M. Zocato*

# Katalunio

* La 7an de februaro Barcelona E-Centro organizis literaturan feston okaze de la vizito de s-roj Herbert Mayer, direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj Manuel de Seabra, tre konata




"La tago kiam Jesuo perfidis Judason" de Manuel de Seabra ĵus aperis eldonita de Herbert Mayer ĉe IEM

verkisto. Ĉeestis pli ol 25 gesamideanoj. La du oratoroj entuziasmigis la aŭskultantojn per la prezentado de siaj respektivaj travivaĵoj en la Esperanta movado, ĉefe rilate al la eldonado de libroj originale verkitaj en Esperanto. En la fino de la festo, s-ro Herbert Mayer prezentis la lastan verkon eldonitan de IEM. Tondra aplaŭdo gratulis ambaŭ prelegantojn.

* Atentu ke la nuna sola valida poŝtadreso de BEC estas: apartado 23484, 08080 Barcelona.

*Salvador Aragay*

* Luz Vazquez gajnis la duan premion de la konkurso organizita de La Ondo de Eperanto per foto kiu montras skulptaĵon de Salvador Jassans staranta ĉe la enirejo de la hospitalo en la vilaĝo Alforja (proksi-



me de Reus). Cetere, Luz informis la skulptiston ke li ricevos revuon el Rusio sur kies kovrilo aperas lia verko. La aŭtoro miris pro tio ke E-o ankoraŭ uzatas kaj montris multan intereson. Luz, kompreneble, jam planas uzi tiun eventon propagandocele.

* La februara babilado organizita de KAE okazis en Premiá de Mar kaj ĉeestis 34 homoj. Ĉi foje la temo estis "La jarcenta bilanco". Post la viglaj diskutoj oni tagmanĝis en apuda restoracio. La sekva babilado okazos la 18an de marto kaj ĝi okazos en la sidejo de Hispana Esperantista Fervojista Asocio, ĉe la stacidomo Clot-RENFE. La proponita temo estos "la oka de marto: tago de la virino".

*Luis Serrano*

# Tutlande

* La revuo Lumen Apothecariorum, en numero dediĉita al Luis Buñuel, publikigis i.a. plurajn tekstojn liajn kun la respektivaj tradukoj en diversaj lingvoj. Manuel Pancorbo kaj Jorge Camacho esperantigis la

poemon "La ĉielarko kaj la kataplasmo" kaj la prozaĵon "Glacia palaco".

La revuon eldonas "Ibérica de Homeopatía, S.L." el Zaragoza (decembro 2000), kaj la titolo de ĉi numero estas: "Recuerdo homeopático a Luis Buñuel". La HEF-biblioteko ricevis plurajn ekzemplerojn.

*Ana Manero*

* Antonio Alonso Núñez, antaŭa HEF-Prezidanto, preparas la hispanlingvan version de la kajero "Brilu ĉiu lingvo samrajte! Por multlingveco kaj egalrajta komunikado en Eŭropo" lanĉita en Hungario okaze de la Eŭropa Jaro pri Lingvoj.

*El "Nia Voĉo"*

* En Februaro samideano Toño del Barrio partoprenis duafoje en la konkurso de Tele 5 "Ĉu vi volas esti milionulo?", kaj denove li elmontris sian lerton tiel ke, ĉi foje, li gajnis 6 pliajn milionojn da pesetoj. Brava knabo!

* Jorge Camacho estas unu el la 10 aŭtoroj pli premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA de la lastaj 50 jaroj. Li ricevis entute 13 premiojn plus 3 menciojn inter la jaroj 1989-99.

* Aperis 2a pliampleksigita eldono de vaska-esperanta retvortaro ĉe: http://esperanto.online.fr/esperant64/eŭskau0.htm

* La programo "Esperanto-ekspreso" de Pola Radio, elsendita la 24an Februaro raportis ke pasintjare okazis en Madrido internacia filatelia ekspozicio. Unu el la eroj estis la kolekto "Ĉapitroj el la Historio de Esperanto", kiu ecx gajnis oran medalon. La novajxo (iom malfresxa, ve!) venis al Pola Radio pere de cxehxa aŭskultanto.

*Dario Rodríguez*



Amalgama
- Esperanto -

Para expresar estos sentimientos, y para incluir los neologismos que vayan surgiendo, el esperanto cuenta con su propia Academia de la Lengua, que funciona de manera similar a cualquier otra y cuya sede esta en Rotterdam (Holanda).

Al habla con el mundo

Marcos Cruz además, forma parte del listado de delegados de la Asociación Internacional de Esperanto. Estos delegados son una referencia para cualquier miembro de la comunidad esperantista que quiera conocer algún dato sobre un determinado país. "Recuerdo el caso" -comenta Marcos Cruz- "de un japonés que me

La Universidad de La Laguna tuvo en su día una cátedra de esperanto



* La revuo "Caminos & Viajeros" (n-ro 2 januaro 2001), eldonata de la vojaĝ-entrepreno Alsa-Enatcar dediĉas en sia angulo "Amalgama" dupaĝan artikolon al Esperanto sub la titolo "La lengua de nadie para todos" (Nenies lingvo por ĉiuj homoj). Buntaj fotoj prezentas planĉan bildon de nia movado, kaj aparte reliefigas la valoron de Pasporta Servo. Tiu revuo estas senpage distribuata al ĉiuj uzantoj de servoj de tiu grava kompanio.

*M. Zocato*

# Valencio

* Ĉi jare la infana "Falla" de la strato Doktoro Zamenhof kaj nordo prezentis ĉiujn siajn afiŝtabulojn en Esperanto. Same ankaŭ la libreto informanta pri ĉi tipa valencia festo prezentos artikolon en Esperanto. La 14an oni starigis la Falla (vidu la foton) kun ĉeesto de esperantistoj.



**Falla Norte-Dr. Zamenhoff.** Armando Serra plantará la falla infantil, dedicada al Dr. Zamenhoff, firmándose el contrato en el mar *«como vínculo que une todas las lenguas».*

* Duagrada E-kurso komenciĝis la 12an de marto en la sidejo de la valencia E-Grupo. Ĝi okazos ĉiulunde je la sepa vespere.

*Augusto Casquero*

# La 12a

La 12a Kongreso de Valencia E-Federacio kaj Murcio okazos ĉi jare en Alicante la 12an kaj 13an de majo. Jen la provizora programo:

Sabato, 12an de majo.

10:00 Akcepto. Disdono de dokumentoj.
11:00 Kunveno de delegitoj.
12:00 Parolado-diskutado.
13:00 Vizito al urba Parko "Lo Morant".
14:00 Libera tempo (tagmanĝo).
17:00 Parolado-diskutado.
18:30 Oficiala malfermo.
19:00 Ĝenerala Kunsido (1a parto)
20:30 Vizito al la urbo.

Dimanĉo, 13an de majo

10:00 Vizito al kastelo "Santa Bárbara".
11:00 Oficiala foto.
11:30 Ĝenerala Kunsido.
13:30 Fermo.
14:30 Bankedo. (2.000 pesetoj)
16:30 Adiaŭo.

Loĝado: mem rezervu!

Hotel Trip Gran Sol. Rambla de Méndez Núñez, 3. Tel: 965-202-000; Indiv/dulita: 14.400 ptojn + IVA; matenmanĝo; urbocentro; Luksa; parkejo. Hotel Sol Inn Gravina, 9. Tel: 965-210-700 Indiv: 8.560; matenmanĝo; Urbocentro; parkejo. Duobla: 10.272 ptojn. Hostalo Campoamor Avda Jijona, 12. Tel: 965-253-097. Indiv/dulita: 5.700 ptojn. Apud taŭrludejo kaj "stratbazaro". Hostalo Cataluña C/ Gerona, 11 965 207 366 Indiv: 3.500: ptojn. Urbocentro. Duobla: 4.800 pesetojn. Pensiono Cabezuelo Fajardo C/ San Fernado, 48, 4, 965-209-094. 2.000 ptojn po persono; urbocentro. Pensiono Navas C/ Navas, 32, 6°, 965-212-165. 2.500 pesetojn po persono; urbocentro.

LKK-adreso: Jose Miguel Bernabeu Egea. Pl. Pio XII, 1-4° C. 03012 Alicante. Telefono: 965-207444. Retadresoj:jmbernabeu@eresmas.com kaj a.casquero@eresmas.net

# Pri E-simbolo

Ĉu la stelo estas moderna simbolo?. Laŭ Northop, entrepreno kiu konstruas aviadilojn, jes. En la kovrilo de la revuo "Aviation Week & Space Technology" (Februaro n-ro 19, 2001) aperas dufoje la simbolo kun stelo, preskaŭ identa al la esperanta.

Nu, ankaŭ mi opinias ĝin taŭga simbolo por esperanto.

*Lupe Sanz-Bueno*

# Projekto Semo

Miguel, kanaria samideano volas agadi en la skolta sfero. Tial li lanĉis proponon en la hispana listo de Interreto:

Li estas skoltestro kaj kunordigas skoltan grupon nomatan

"Tigotan". Li deziras instrui la internacian lingvon precipe al la geknaboj de la grupo. Sed li volas reale uzi la lingvon jam de la komenco. Tial li proponas korespondan reton por interŝanĝo de informoj, novaĵoj, adresoj (interretaj aŭ poŝtaj), kaj por starigo de kontaktoj, anoncado de aranĝoj, kaj ĉio celanta disvastigi la internacian lingvon kaj la solidarecon en la skolta mondo.

Interesitoj kontaktu lin pere de Intereto ĉe: "rann_tigotan@hotmail.com" aŭ per normala poŝto pere de Boletín.

*M. Zocato*

# Estrarkunsido

Kunvokitaj de la Prezidanto la Estraro de HEF kunsidos en la Centra Oficejo la 31an de marto de 2001, je la 10a a.m., kun jena tagordo:

— Revizii la (ne)plenumon de antaŭaj decidoj.

— Kontroli la buĝeton por 2001.

— Pritrakti la preparojn por Expolingua-2001 (19a al 22a aprile).

— Pritrakti la preparojn por la Kongreso en San Javier (22a, 23a kaj 24a junie).

— Ĉefdelegiteco de UEA en Hispanio.

— (Re)elekto de komitatano A ĉe UEA (nuna: Luis E. Hernández)

— Nova respondeculo por Libroservo.


— Prikomenti la renovigon de la Estraro.

— Priktrakti la eldonadon de la Granda Vortaro Español-Esperanto.

# UNESKO-premio al ERA

La Unesko-Centro de Eŭska Lando (UNESKO-Etxea) premiis "Esperanto"-Radikalan Asocion (ERA) pro ĝia "ege rimarkinda kontribuo al la redaktado de la Monda Raporto pri la Lingvoj", kiel oni povas legi en la letero akompananta tiun meritateston. Tiu raporto, kiun Unesko eldonos en la jaro 2001, konsistas el la unua kompleta kaj oficiala studaĵo pri la "sanstato" de ĉiuj lingvoj ankoraŭ parolataj en la mondo. Ĝin prizorgis, dum la lastaj jaroj, la Centro de Bilbao. Tiu agnosko reatestas ne nur la prestiĝan pozicion de ERA inter la esperantistaj organizaĵoj, sed ankaŭ ene de la "UNESKO-sistemo", reliefigante la gravecon de la kunlaborado kun tiu Organizaĵo.

*El Ret-info*



# Ĉirkaŭ



# la mondo

* La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, nombras 1161 gastigantojn 80 landoj. En 2000 la reto de gastigantoj konsistis el 1075 adresoj en 76 landoj. En du jaroj la reto kreskis preskaŭ je unu kvarono, ĉar en 1999 ĝi ampleksis 945 adresojn. En la 198-paĝa poŝlibro troviĝas la adresoj kaj informoj pri la gastigantoj, mapoj kaj konsiloj pri la uzo de la servo kun aliaj utilaj adresoj.Mendu la adresaron ĉe UEA (10,80 eŭroj plus 6% AVI).

* NAFSA raportas ke internaciaj studentoj signife kontribuas al naciaj ŝtataj kaj lokaj ekonomioj. Dum la akademia jaro 1999-2000 en Usono, pli ol 500.000 internaciaj studentoj elspezis pli ol 13 miliardojn de dolaroj por edukadkotizoj kaj vivkostoj. Interacia edukado estas por Usono la kvina eksportfonto en la serva sektoro. Por plia informado vidu: http://www.nafsa.org/int-ed/alliancepaper.html

* Nederlanda E-Asocio infomras pri la afero de forigo de nomo de Zamenhof-strato en Zwolle ke la magistrato jam sendis respondon, antaŭ kelkaj tagoj, al ĉiuj, kiuj plendis, informante ke, malgraŭ la ŝanĝo de nomo, kompense oni nomos "Zamenhof" trafikcirklon ĝuste je la fino de la nuntempa Zamenhof-strato, kie, krome, troviĝas monumento al Zamenhof.


Lavango da mesaĝoj venis al la komunum-estraro kaj la afero tiris la atenton de, unue, regiona televido kaj radio, poste ankaŭ de landaj televidstacioj, kiuj en kelkaj novaĵ-elsendoj montris bildojn de la Zamenhof-singel, la monumento de Zamenhof kaj la trafikcirklo, kiu post la nomŝanĝiĝo de la strato ricevos la nomon Zamenhof. Du esperantistinoj en Zwolle estis filmitaj dum ili promenislaŭ la Zamenhofstrato kaj elbuŝigis sian proteston kontraŭ la nomŝanĝo (Hans ten Hagen).

* Kurso pri la Ibera Skolo, gvidata de Georges Lagrange, okazis de 27.02 ĝis 03.03 en Kvinpetalo Esperanto-Centro, Rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel:+33-(0)5.49.42.80.74. Rete: "kvinpetalo@club-internet.fr"

* Trovanto, retkatalogo de Internacia E-Muzeo, kreskis jam super 16000 rikordoj (vidu Boletín 349, p. 16).

* Esperanto-Garden, kursejo kaj gastigejo de Sveda Esperanto-movado (okcidenta Svedio, inter Stokholmo kaj Oslo) organizas ĉi-somere Laborbrigadon kunlabore kun Service Civil International (SCI), internacia organizaĵo por tendaroj de volontuloj.

La volontultendaro komenciĝos la 24an de junio 2001. Funkcios diversnivelaj E-kursoj, komunaj kunvenoj, kulturaj distraĵoj kaj amuzaĵoj, kaj, kompreneble, oni okupiĝos pri riparlaboroj en la kursejo kaj la ĝardeno. La laborlingvo estos Esperanto. Rilate al la kondiĉojn validas la reguloj de SCI. La aliĝilon sendu al la volontulorganizaĵo de via lando (vidu en Internet ĉe CSI: http://www.ines.org/sci/). Scio de la angla lingvo ne estas bezonata, eĉ se la informoj de via lando asertas tion (Ret-info, Bengt Nordlof <bengt@zeta.telenordia.se>).




* Universala Esperanto-Asocio estas kandidato por la ĉi jara Pacpremio de Nobel. Laŭ provizoraj informoj, UEA estis kandidatigita de membroj de registaroj aŭ parlamentoj almenaŭ el Francio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Litovio, kaj de proponrajtaj universitataj profesoroj almenaŭ el Ĉeĥio, Hispanio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Usono.

* En la Lublina Politekniko Esperanto estas oficiale instruata kiel dua elektebla lingvo por studentoj studantaj Protekton de Medio jam de 1995. Kvarono aŭ triono de la studentoj elektas Esperanton kiel duan lingvon (unua estas la angla). La studado daŭras du semestroj (60 horojn) kaj ĉi jare Esperanton studas 35 personoj (Pof. Witold Stepniewski).

* La 57a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto (tuj post la UK en Zagreb) en Strasburgo, sidejo de la Eŭropa Parlamento.

Kadre de la IJK okazos surstrata arta festivalo kun E-artistoj el la tuta mondo. Lige kun ĝi kaj precipe ankaŭ kun la ĉeftemo de la kongreso: "Plurlingvismo — kiel ĝin sukcesigi ?" estas lingva festivalo kiu temos ne nur pri Esperanto sed oni informos tiam pri multaj diversaj lingvoj. Evidente, tiuj aranĝoj celas precipe ankaŭ la ĝeneralan publikon kaj sekve la IJK estos malferma aranĝo.




Oni povos loĝi en moderna junulargastejo kaj apuda tendumejo kaj, krom la kutima riĉa taga, vespera kaj nokta programoj:


prelegoj, diskut- aŭ laborrondoj, ne mankos nokta diboĉado kaj allogaj ekskursoj en Francio kaj Germanio.

* La 74a Kongreso de SAT, Sennacia Asocio Tutmonda, okazos inter 14-20. 07. 2001 en Nagykanizsa, Hungario. En la kongresa programo troviĝas prelegoj, diskutoj kaj fakaj programeroj. Kiu volas dumkongrese ekskursadi povas viziti ne nur la ĉirakŭaĵon sed preskaŭ la duonon de la lando. Informas: Sponzor Tours; Sugar u. 3; HU-8800 Nagykanizsa; Hungario; Rete: sponzortours@matavnet.hu




* Ĝis la 5a de februaro, 1070 kongresanoj el 50 landoj alighis al la 86a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Zagrebo, Kroatio.

* Jen eLibrejo, interreta "libroservo" kun elektronikaj libroj, proponas manplenon da titoloj. "Pastaĵo — konsideroj kaj historio" de Marco Picasso. Ankaŭ eLibroj por infanoj: "Emilo en Smolando" de la sveda verkistino Astrid Lindgren kaj libreto de Franjo Modrijan, "Fabeloj", originale verkita en esperanto. Kaj ankaŭ disponeblas alispecaj libroj kiaj "Doktoro Jekyll kaj sinjoro Hyde" de R. L. Stevenson, "La tempo-maŝino" de H. G. Wells, ktp. Nu, jen la adreso de la retsidejo de eLibrejo, kie vi povos preni la librojn senpage: http://esperanto.nu/eLibrejo. (*Franko Luin* )



**Libroservo de HEF**

**Apartado 119**

**47080 Valladolid**

**Tel: 983-26-00-86**

**Sufloru ĝin al via amikoj:**

**www.esperanto-es.net**

# 60a Hispana Esperanto-Kongreso

De la 22a ĝis la 24a de junio 2001
(Postkongreso de 25a ĝis 30a de junio)

## Provizora Programo

Vendredo, 22a de junio
10.00 - 20.00. Disdono de dokumentoj.
10.00. "Filatela ekspozicio"
10.00. Malfermo de Libroservo.
14.00. Manĝo-paŭzo
18.00. Kurso.
19.00. Seminario: "Eldonado de libroj, revuoj kaj bultenoj per komputilaj rimedoj". Gvidos Miguel G. Adúriz.
20.30. Estrarkunsido.

Sabato, 23a de junio
10.00. Malfermo de "Filatela ekspozicio"
10.00. Malfermo de Libroservo.
10.30. Solena inaŭguro de la kongreso.
11.30. Inaŭguro de esperanto-fako ĉe la urbodoma biblioteko.
12.00. Oficiala inaŭguro de la esperanto-grupo "Malgranda Maro".
12.30. Oficiala foto.
13.00. Prelego
14.00. Manĝo-paŭzo
18.00. Kurso.
19.00. Daŭrigo de la seminario.
20.00. Prelego

Dimanĉo, 24a de junio
10:00. "Filatela ekspozicio"
10.00. Malfermo de Libroservo.
11.00. Ĝenerala Kunsido
14.00. Manĝo-pauzo.
18.00. Kurso.
19.00. Daŭurigo de la seminario.
20.00. Premio Klara Silbernik.
20.30. Oficiala fermo.

Verŝajne eblos spekti kelkajn aranĝojn organizitajn de oficialaj instancoj de San Javier:

— Aeraj manovroj fare de "Escuadrilla Los Águilas" de la "Academia general del Aire".

— Prezentado de junula folklora ensemblo: "Coros y danzas de San Javier".

— Prezentado de "Trompetas y tambores de San Javier".

— Kiu ajn alia aranĝo organizota de la urbodomo kun libera publika aliro.

Postkongreso:

Krom ĝui veteron kaj ferilokon, la gekongresanoj havos la ŝancon partopreni en jenaj aktivaĵoj, programotaj dum la kongreso:

— Kurso. Daŭrigota se petite de kursanoj.

— Seminario. Daŭrigota se petite de partoprenantoj.

Noto: Dum la tri unuaj tagoj (22a, 23a kaj 24a de junio), la kongresejo estos "Centro Cívico, Parque Almansa" en San Javier. Kaj la postkongresaj aranĝoj okazos en "Centro Cultural Principe de Asturias", en Santiago de la Ribera (tre apuda urbeto).

# Triopa utilo de Esperanto[1]

Traduko el la hungara originala teksto disponigita de la aŭtoro.

Laŭ la tre interesa enketo (2) de P. Medgyes kaj M. László, inter la *ceteraj* faktoroj helpantaj la lingvolernadon —krom la eksterlanda restado— la plej grava estas la *konscia lernado*. Tamen inter la ceteraj faktoroj mankis la *antaŭe lernita alia lingvo*.

Estas banalaĵo, ke lernadon de iu lingvo helpas, se la koncernulo jam lernis alia(j)n lingvo(j)n. Tio tiel ne estas vero. Li povis lerni kiom ajn da lingvoj, sed se li *el*lernis ne eĉ unu ĝis uzebla nivelo, pro tio ankaŭ la sekva ne lerniĝos pli facile. Oni diras, ke surbaze de la latina la lernado de ĉiuj aliaj lingvoj estas facila. Sed la latinon de komplika gramatiko, plenan de neregulaĵoj, ja ege malmultaj kapablis *el*lerni. Por roli kiel efika fundamento estas taŭga nurnure tia lingvo, kiu *alproprigeblas dum tre malmulte da tempo, paroleblas flue kaj havas esprimkapablon minimume tian, kian la naturaj lingvoj*. Jam laŭ Comenius estas kreebla lingvo dekoble pli facila ol la latina (3).

Inter la ĉ. mil (4) *planitaj lingvoj* la lingvo *Esperanto,* iniciatita en 1887 kaj de tiam memregulate evoluanta, turalte elstariĝas. 95% de la literaturo de la planitaj lingvoj (ĉ. 10.000 volumoj da libroj, 43.000 jarkolektoj de 10.500 periodaĵoj (5) ktp.) aperis en Esperanto.

*Dum kiom da tempo estas alproprigebla Esperanto? Kaj la angla post Esperanta bazado, kaj ambaŭ kune?* Mi citas la donitaĵojn de mia propra lernado.

Mi ekkonis Esperanton aŭtune de 1959, en mia 31a jaro, enkadre de 32 studhora (16 semajna) kurso de TIT (Sciencpopulariga Societo, Budapeŝto). Al tio aldoniĝis 82 horoj da individua lernado (ĉefe sur la tramo). Tio estas sume 114 horoj. Mi notis en mia vortarkajero 1800 Esperantajn vortojn. Miaj elspezoj (kurso, libro, kajero, vortaro) sumis 200 forintojn. Post la dua semajno mi vigle korespondadis, post du monatoj mi fintradukis unu el miaj matematikaj artikoloj. (Mi notas, ke en la mezlerneje „lernitaj" latina, germana kaj itala lingvoj mi ne povis eĉ ekparoli, eble iomete en la germana, tre primitive.)

Mia sistema lernado de la angla komenciĝis aŭtune de 1960, same en TIT-kurso (64 horoj/semestro). Fine de la unua monato, kiam aperis la Present Continuous Tense, duono de la partoprenantoj forlasis la kurson, kaj en la kvara semestro mi restis sola el tiuj komencintaj kun mi. Miaj penadoj dum la kursoj de du kaj duono da jaroj elmetis 352 horojn, kun privata instruisto 28, sume 380 horojn, kiun mi kompletigis per individua lernado al 1100 horoj. En miaj kvin vortarkajeroj mi skribis 12.500 vortarliniojn, signantaj ankaŭ la prononcon, akcenton kaj neregulaĵojn. Mia tuta elspezo estis 5000 forintoj. (En tiuj jaroj la inflacio estis sensignifa.) Mi faris mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon en 1963.




En la sekva periodo mi multe korespondadis en Esperanto, multe tradukadis el la angla kaj legadis en ambaŭ lingvoj. En 1960 mi senriproĉe kapablis Esperante babili kun, kaj fake interpreti al, miaj unuaj eksterlandaj vizitantoj el Pollando. En 1968, post 20 horoj da Esperanta kaj 120 horoj da angla vortaro- kaj gramatiko-ripetado, mi sukcesis en la supera-grada ŝtata lingvo-ekzameno en ambaŭ lingvoj, kaj tuj poste mi pasigis unu jaron en Usono. Hodiaŭ mi parolas, skribas, legas, prelegas en ambaŭ lingvoj.

Por atingi la nivelon de la ŝtata supera-grada lingvo-ekzameno en Hungario, oni bezonas —laŭ la opinio de multaj— averaĝe 2000 horojn da lernado, kaj mi opinias, ke ankaŭ mi estus bezoninta tiom. Tamen mia sistema lernado elmetis nur 114 + 20 = 134 horojn en Esperanto, 1100 + 120 = 1200 horojn en la angla. Tiel la alproprigo de la du lingvoj unu post la alia elmetis 1354 horojn, do 32 procentojn malpli ol bezonintus nur tiu de la angla, sen la propedeŭtika efiko de la *el*lernita Esperanto. Post 800 horojn da sistema lernado en 1969/70 (kio same preskaŭ tute havis lokon en la 2000 horoj) mi akiris superan gradon ankaŭ pri la hispana, poste mi pasigis sume tri monatojn en hispanlingvaj landoj kaj prezentis eĉ prelegojn. (Tamen tio ne estis sufiĉa por daŭra konserviĝo, kaj pro manko de uzado mia hispana scio pasiviĝis, kiel mia scio ankaŭ de aliaj lingvoj estas pasiva.)

Laŭ eksperimentoj pri instruado (6), post antaŭstudado de Esperanto lernis la anglan la hungaraj lernejanoj je 40%-oj , la germanaj je 30%-oj pli rapide ol siaj samlernejanoj, kiuj komencis lerni la anglan sen Esperanta bazado. (Cetere la lernantoj komencintaj per Esperanto atingis averaĝan rezulton pli bonan je ĉ. duonnoto en matematiko, geografio, sia gepatra lingvo kaj kompreneble ankaŭ en alia(j) fremda(j) lingvo(j). Do pruviĝis, ke

1. *Esperanto, lernita per „dekona laciĝo"* (7), *tiom mallongigas la tempobezonon de la lernado de la sekva(j) lingvo(j), ke tio en si mem jam estas sufiĉa kaŭzo lerni ĝin.*

Tamen, la Esperanta literaturo en 1999 jam havis kandidaton ankaŭ por la Nobel-Premio, eĉ se li ne ricevis ĝin (do post 113 jaroj ĝi statas tie, kie la 800-jara hungara literaturo). La kandidato, William Auld, neniam aŭdis pri Madách ĝis li ne ricevis la Esperantan tradukon de *La trage-*

*dio de l' homo (8).* De tiam li estas entuziasmulo de la hungara literaturo. Tamen li serĉis la anglan tradukon de la verko kaj proksimume tiel li esprimis sian opinion: Se la verkon de Madách mi ekkonintus en la traduko de tiu buĉisto, min ne interesus la hungara literaturo.

La famaj kreaĵoj de la 5000 jaroj de la mondliteraturo estas legeblaj en Esperanto (la unua traduko de la *Hamlet* jam el 1894). Ankaŭ la originala Esperanto-literaturo estas tiel signifa kiel la literaturo de multaj malgrandaj popoloj, sed ĝiaj kreantoj naskiĝis sur la kvin kontinentoj, kaj tiel ili kreis unike multkoloran literaturan kulturon. Pruviĝis, ke Esperanto estas taŭga ankaŭ por la kultivado de la sciencoj. Estas ankoraŭ inde mencii la ĉiujare plurcent internaciajn renkontiĝojn kaj konferencojn, kie Esperanto rolas kiel nemalhavebla viva lingvo. Sekve

2. *estas inde lerni Esperanton eĉ por ĝi mem.*

Fine indas mencii la problemon de la pluekzisto de nia gepatra lingvo, pri kio „vidante la nekontraŭstareblan antaŭeniĝon de la angla" la aŭtoroj de la artikolo pri sia enketo ĝojas, ĉar „feliĉe [ili] ne devas okupi starpunkton en la delikata demando, ĉu ili salutas aŭ kondamnas tiun procezon". Estas kiu prognozas ke post tricent jaroj pluekzistos nur la angla, ĉina kaj hispana, kvankam li permesas, ke ankaŭ certaj grandkulturaj lingvoj povos rezisti iom pli longe (9). Tamen

3. *la tempo liberigita el tiu de la lernado de fremdaj lingvoj estus dediĉebla al la la flegado kaj evoluigo de la gepatra lingvo.*



# Forpasis

José M. González Aboín forpasis en Madrido la 23an de septembro de 2000.

Li estis Dumviva Patrono de UEA, Dumviva Membro de Hispana Esperanto-Federacio kaj iama Prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo.

Li esperantiĝis ĉirkaŭ 1960 kaj aktive partoprenis en la organizado de la U.K. de Madrido en 1968. Kutime li ĉeestis Internaciajn Esperantajn Kongresojn kiel geografa inĝeniero. Li reprezentis Hispanion en internaciaj komisionoj, inter ili el geografoj, kie li proponis la oficialan uzadon de E-o kiel internacia lingvo por geografiaj nomoj. Li estis kolektanto de vortaroj de ĉiuj lingvoj, inter ili multaj de esperanto.

Li pace ripozu.

*Lupe Sanz-Bueno*

*La nuna futuro-bildo*: La naskitaj anglalingvuloj, sumantaj ĉ. 7%-ojn de la tutmonda loĝantaro, ne devas lerni alian lingvon, 93%-oj devas (en 2000 horoj/kapo, por la malutilo de sia gepatra lingvo kaj alidirekta kleriĝo, aŭ simple de sia libertempo). Tiu ĉi stato daŭros ĝis la angla fariĝas gepatra lingvo de ĉiuj (se intertempe ne anoncas sin alia kandidato, je kio jam estis pluraj ekzemploj, kaj la eblo ankoraŭ ekzistas).

*Alternativa futuro-bildo*: La tuta loĝantaro de la mondo (ankaŭ la anglalingvanoj) devige lernas Esperanton en 100-200 horoj (ja tio dependas ankaŭ de sia gepatra lingvo) kaj fariĝas egalulo en la lingva interkomunikado (kaj kompreneble povas lerni ankaŭ aliajn lingvojn laŭ persona plaĉo). Tiom da ŝarĝeto estos eble tolerebla senfine eĉ por la gepatraj lingvoj. Ady (10) ne vane konsideris Esperanton vivneceso de la hungaroj, „kiu lude enŝtelas nin inter la kulturpopolojn" (11).

*Haszpra Ottó* (12)

Notoj:

1 La hungarlingva originalo, Az eszperantó hármas haszna, de tiu ĉi diskut-artikolo aperis en la numero 2001/2 de la monata organo *Magyar Tudomány* (Hungara Scienco) de la Hungara Scienca Akademio. Esperantigis la aŭtoro.

2 Medgyes Péter – László Mónika: A magyar kutatók idegennyelv-tudása az 1990-es évek végén (Fremdlingvo-scio de la hungaraj esploristoj fine de la 1990-aj jaroj). *Magyar Tudomány*, 2000/8.

3 Szerdahelyi István: *Bábeltol a világnyelvig* (De Babelo ĝis la mondlingvo). Gondolat, 1977.

4 Blanke, Detlev: *Internationale Plansprachen*. Akademie-Verlag, Berlin, 1985.

5 Máthé Árpád.: Bibliografio de la Esperanto-periodaĵoj. *Memorlibro* (Studoj por la Internacia Konferenco de la Katedro de Ĝenerala kaj Aplika Lingvistikoj de Universitato ELTE, Budapeŝto, 1997. apr.17-18). Felsooktatási Koordinációs Iroda, Budapest. 1998.

6 Frank, Helmar.G.: Kibernetike-pedagogia teorio de la lingvo-orientiga instruado. *9a Internacia Kongreso de Kibernetiko*, Namur, 1980.

7 Bárczi Géza: Az eszperantóról (Pri Esperanto). *Világ és Nyelv*, 1973. október.


8 Madách, Imre: La tragedio de l' homo (Tradukis: Kálmán Kalocsay). Corvina, Budapest, 1965.

9 Fischer, S.R.: *A History of Language*. Reaktion Books, 1999.

10 Ady Endre (1877-1919) estis eble la plej granda hungara poeto de la 20a jarcento.

11 Ady Endre: Egy magyar probléma (Unu hungara problemo). *Budapesti Napló*, 1906. szept. 4.

12 Membro de la sciencaj akademioj Hungara kaj Novjorka, krome AIS kaj ISAC.




## Astronomio

Aperis la libro "La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo (elementa kurso pri astronomio)". Kuneldonita de FEL kaj Fundación Esperanto. La aŭtoroj estas D-ro David Galadí-Enríquez, esploristo de la Astrobiologia Centro (Madrido), tre bone konata danke al liaj interese instruaj prelegoj en la kongresoj de Kastelono kaj Madrido kaj D-ro Amri Wandel, profesoro en la Universitato de Jerusalemo.

M. Zocato




YAMASAKI Seikî: "Enkonduko en la japanan". Chapecó: Fonto 2000. 184 p.

# Interesa enkonduko

Bone konata kiel eldonejo de beletra literaturo, la brazila Fonto prezentas nun prilingvan verkon de YAMASAKI Seikî, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de etimologia vortaro. Temas pri enkonduko en la lingvon japanan. Kiu volas lerni ĝin, trovos ĉi-libre la unuajn ŝtupojn aŭ paŝojn (tamen ne pri la skribo: la tekstoj kaj vortoj de la lecionoj aperas en latinlitera transskribo; kanaojn kaj ideogramojn oni lernu aparte). Aliajn legantojn certe interesos kaj kontentigos ĉi-forma superrigardo, kun oftaj komparoj kun esperanto kaj diversaj lingvoj, kiel la ĉina, la angla aŭ la hispana. La aŭtoro deklaras, ke li ne kredas je la t.n. rekta metodo, kaj do sekvas pli tradician sistemon: unue gramatikon, poste traduk-ekzercojn. La gramatikaj klarigoj, ege precizaj, foje ŝajnas verkitaj speciale por lingvistoj; tamen mi konfesu, ke mi tralegis pli atente nur la unuajn lecionojn, kaj ke la ceteron mi esploris iom papilie. Koncerne la ekzercojn, temas pri grupo (ekzemple deko) da frazoj sen evidenta rilato unu al la alia. Mi preferintus frazojn konsistigantajn koheran tekston kaj do ankaŭ kuntekston. Des pli se oni povus uzi ilin en probablaj situacioj inter "normalaj" japanoj. Tial mi trovas maloportunaj la multajn ekzemplojn, kies temo estas esperanto ("Oni diras, ke Tolstoj ekregis esperanton en du horoj", p. 117). Sed mi ne dubas, ke la sekva frazo estigus viglan diskuton, se dirata en japana medio (p. 91): "Estis bone, ke Usono faligis atomajn bombojn sur Hiroŝimon kaj Nagasakon ĉe la fino de la milito".

*Jorge Camacho*


MATTOS, Geraldo: "En la komenco estas la VORTO". Chapecó: Fonto 2000. 166 p.

# La facila lingvo

Unu tezo resumas ĉi verkon de akademiano Geraldo Mattos: en esperanto, "la procedoj por la konstruo de la propozicio kaj por la konstruo de la vorto estas absolute identaj, kaj ilin ni devus resumi per la nomo "sintakso de la propozicio", kaj tion neniu neas, kaj "sintakso de la vorto", kaj tion tre multaj ignoras". Tiun tezon Mattos prezentas en fascina maniero, tiel ke apenaŭ eblus ne konsenti kun li preskaŭ centprocente. Temas ne pri manlibro, sed pri traktato, eseo aŭ studo, ĉiel ajn miloble pli klara kaj interesa ol la dinosaŭra PAG (kiu kaprice malpermesas formojn kiel "gebofratoj"). Tamen por konsultaj celoj mi rekomendus la ĝis nun nur rete legeblan

"Plena Manlibro de E-Gramatiko" (PMEG), de Bertilo Wennergren (kiu, cetere kaj neklarigeble, mankas en la bibliografio).

Mi povas epiteti ĉi libron unuvorte: bonega! Dirinte tion, oni permesu iom da konstrua kritiko miaflanka.



En p. 49 k.s. Mattos konvinke refutas la argumentojn de Kalocsay kaj Waringhien en PAG pri la analizo de vortoj kiel "trinkigi" (aŭ "venigi", p. 52). Tamen ne necesas tro rigori; en p. 48 li asertas, ke verbo kiel "klarigi" nepre signifas nur "igi klara" kaj do implicas, krom la agon, ankaŭ la rezulton. Sed kion do fari pri vortoj kiel "kulpigi" (t.e. akuzi) kaj "pravigi"? Ĉu oni ekzilu, ekscizu, eliziu ilin el la lingvo? Ne, certe ne, ni ne ripetu la eraron idigi aŭ volapukigi esperanton. (Parenteze, oni komparu la signifojn de la vortoj "japanigi" kaj "francigi" en PIV!). Same kiam li skribas: "Ni simple ne povas akcepti, ke la vortoj "belo" kaj "beleco" estas sinonimoj" (p. 58); nu, foje ili sinonimas, kaj nenies hepato krevas pro tio. Malgraŭ lia aserto en p. 112, en la skriba kaj parola lingvoj ekzistas formoj kiel "fekundo", "klero", "nudo" kaj "inteligento". En kelkaj ĉi tiaj okazoj li kvazaŭ verkas nur por (amatoraj) lingvistoj kaj esperantologoj. Similan pekon li faras en la same studinda libreto "Apartaj mondoj: verboj kaj participoj" (Fonto, 1999); mi ankoraŭ ne komprenas la pretendatan malĝustecon (p. 67 ĉi-librete) de la vorto "suferitaj" en jena (mia) frazo: "Usono ankoraŭ ne pagis reparacion al Irako pro la damaĝoj suferitaj dum la milito". Por mia orelo "suferataj" implicus nunan militon (kio fakte okazas, cetere). Sed ni lasu ĉi temon kaj reiru al... la vortoj.

Foje Mattos demandas sin (kaj onin) "kial la subjekto estu la sola escepto en regula lingvo, kia estas esperanto?" (p. 33), kaj, kvankam mi konsentas kun lia tiu-alinea argumentado, oni povus repliki dirante, ke esperanto ne estas plene regula, kaj ke estas ĥimero provi postuli en ĝi ĉiean simetrion. Tiurilate Wennergren en PMEG restas pli proksima al la efektiva uzo anstataŭ al teoriaj ekzemploj (almenaŭ miasperte) kiel "murpentri" (p. 83). Ja Mattos mem uzas la formon "geleganto" (p. 120, singulare), kiun aliaj opinius kontraŭ-, mal- aŭ anti-gramatika!

Tre plaĉas al mi la grafika prezento, la diagramoj, per kiuj Mattos bildigas la sintakson de vortoj kaj propozicioj. Tamen en p. 140 (oni komprenu, ke ĉi tie ne eblas ĉion reprodukti fidele), [sek/vin//ber///o] devus esti [sek//vin/ber///o], ĉar la formo "sekvino" (p. 144) nek ekzistas nek povas ekzisti, krom se oni parolus pri sablosuko. Same, kaj sampaĝe, misteras al mi "virgharingo": pri kia klupeo temas? Cetere, anstataŭ "membro(-)abonanto" (p. 146), "ŝtato(-)membro" k.s., plumpaj paŭsaĵoj el la franc-angla, mi diras ja "abonanta membro" kaj "membra ŝtato", en plene bela esperanto.

Krome ŝoketis min vortoj kiel "konstruktura" (p. 10: certe ne "kon-struktura", sed "konstru-...kia?"), "animala" anst. "besta" (p. 15: la animala regno inkludas bestojn kaj homojn) kaj "akcidenta" anst. "akcidenca" (p. 19 k.a.). En la fino aperas tre utila 5-paĝa lingvika glosareto, kie indus aldoni "denotacia" (p. 44) kaj "diskurso" (p. 18).

Fine mi insistu, ke ĉiuj ĉi riproĉetoj neniom deprenas de la kvalito de la verko, kiun mi absolute kaj senrezerve rekomendas. Amen.

*Jorge Camacho*

## Memmortigo

estas la nomo de filmo de Delmiro de Caralt pri kiu mi lanĉis demandon en Interreto kaj en la antaŭa numero de Boletín. Nun jen pliaj detaloj pri la afero.

Finfine mi sukcesis paroli kun respondeculo de la Biblioteko (Mercè Rueda), kaj ŝi konfirmis al mi ke la filmo estas originale filmita en esperanto, kvankam ŝi ne sciis ĉu la aŭtoro estis esperantisto. Oni povas spekti ĝin en la Filmokolektejo (strato Portal de Santa Madrona, 6-8, Barcelono), en filmo 16-milimetra aŭ en video. Ŝajnis al ŝi ke iam oni jam uzis la kopion en E-renkontiĝoj.

La direktoro estas konata ankaŭ kiel pioniro kaj mecenato de la avangarda kino en Hispanio (mi ne scias ĉu tio iamaniere rilatas al la uzo de nia lingvo en la filmo). Ekzistas biografio pri li eldonita de Fundació Mediterrània (mi ne scias ĉu la nomo ĝustas).

*Toño del Barrio*

EXPO LINGUA

## Expolingua 2001

Ĉi-jare Expolingua okazos de la 19a ĝis la 22a de aprilo, en la pavilono 11 ("la pipa") ĉe la foirejo de "Casa de Campo".

HEF disponos pli grandan standon (n-ro: 89) ol pasintjare kaj kalkulos je la malavara financ-helpo de la entrepreno INALTEL, kiu donacos por la okazo 150.000 ESP.

Inter la aktivaĵoj ĉi-jare prezentotaj menciindas la ĉeesto de Miguel Fernández (sabaton, la 21an, de la 18.00 ĝis la 20.00), verkisto kaj tradukinto de Lorca en esperanton, kiu volonte subskribos siajn verkojn en la stando; kaj la antaŭpublika prezentado de esperanto far Miguel Gutiérrez Adúriz (dimanĉon, la 22an, je la 13.00), en salono preparota de la organizantoj por la okazo.

Kompreneble, en la Eŭropa Jaro de la Lingvoj, esperanto ne povas malĉeesti la foiron.

*Ana Manero*

# Muziko

## Esperanto desperado



Jen dana-pola-bosnia grupo, kies kantoj estas ne nur ritmaj, humoraj kaj orelfrapaj, sed ankaŭ origine esperantaj.

Lastajn 5-6jarojn la grupanoj ludis en diversaj konstelacioj, en diversaj aranĝoj. Sed unue en la somero 2000, en la kulturfestivaloj: KAFE kaj KEF, ili serioze iĝis bando kaj fine pretis por sia unua k-disko.

La kantoj estas plejparte de Amir Hadziahmetoviĉ kaj Kim J: Henriksen. Ili renkontiĝis kune kun Helle Eble Cleary, kiam Amir venis el Bosnio en Danion fine de 1992. Sur la k-disko li unuafoje prezentas tekstojn en Esperanto. Kim J: Henriksen, certe ĉiuj rememoras la grupon Amplifiki por kiu li verkis la kanton Sola (el la kasedo "tute ne gravas").

Ĝuste la Amplifiki-kantaĵoj estis la bazo de la repertuaro en la komenco. Tial la grupo tiam nomis sin Brokantaĵo, kaj tiel daŭrigis la vortlud-tradicion de la unuaj rokbandoj.

Tiutempe ili ludis en danaj kafejoj por ne E-publiko. Ĉar la nomo "Brokantaĵo" ĉiam estis elprononcita malĝuste kaj ankaŭ neniam komprenita, ili en la printempo 1997 sanĝis la nomon al la nuna Esperanto-Desperado, kaj tuj ili estis invititaj ĉe la dana radio en populara posttagmez-programo kaj tie vive ludis 2 kantaĵojn.

Ĝis la somero 2000 ili kutime ludis pli aŭ malpli akustike. Ofte kun la instrumentoj akordiono, fluto kaj gitaro, kaj dum periodo kun kongasoj. Sed en la printempo Brian Laustsen revenis de unujaran mondvojaĝon kaj kune kun li kaj drumisto Tomas Crawfurd, Kimo kaj Amiro (Helle ne povis) koncertis en KAFE kaj KEF 2000.

Kaj nun jen ilia unua k-disko!

Tiu 12 titola k-disko, referenco : VKKD 34, broKANTAĴOJ disponeblas ĉe la kutimaj libroservoj aŭ rekte ĉe Vinilkosmo (Esperanto-Muzik-Prod.; FR-31450 Donneville; Francio. Tel/faks :+33-5-61-81-95-65; Ret: vinilkosmo@esperanto.org



# Lingva Angulo 15

de Antonio Valén

## PARONIMOJ (2)

Ankaŭ en ĉi Lingva Angulo ni parolu pri paronimoj, t. e. pri vortoj preskaŭ samsonaj kun aliaj, sed sence malsamaj. Ĉiuj difinoj kaj multaj ekzemploj fontas el *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV). Jen:

**kolono** estas "vertikala cilindro uzata kiel subtenilo aŭ ornamo de konstruaĵo" kaj ankaŭ "formacio, kies elementoj estas aranĝitaj unu malantaŭ la alia por marŝado aŭ atako", nome *columna*: ***korintika kolono***, *columna corintia*; *Fig.* ***la Herkulaj kolonoj***, *las columnas de Hércules*; ***la egipta kolono trairis la dezerton***, *la columna egipcia atravesó el desierto*; *Fig.* ***la kvina kolono***, *la quinta columna.* Tamen **kolumno** estas "vertikala dividaĵo de paĝo prezentanta serion da samlongaj linioj skribitaj aŭ presitaj unu sub la alia": ***la kolumnoj de ĵurnalo***, *las columnas de un periódico*; ***la kolumno de la unuoj, de la dekoj, de la centoj***, *la columna de las unidades, de las decenas, de las centenas*; ***vertebra kolumno*** (= ***vertebraro***; ***spino***), *columna vertebral.*

**fondi** estas "starigi (konstruon) sur io": ***arko fondita sur pilieroj***, *arco fundado sobre pilares*; kaj ankaŭ "esti la unua, kiu starigas (konstruon) komencante de la fundamentoj": ***helenaj kolonianoj fondis Marsejlon***, *Marsella fue fundada por colonos griegos.* Same pri institucioj: ***fondi societon***, *fundar una sociedad.* Kaj fine, ankaŭ figure: ***opinio fondita sur profunda sciado de la historio***, *una opinión fundada sobre sólidos conocimientos de historia.* Sam-radike: ***la fond(ad)o (aŭ la fondiĝo) de urbo***, *la fundación de una ciudad*; ***la Fondaĵo Esperanto***, *la Fundación Esperanto*; ***la fondinto de nia klubo***, *el fundador de nuestro club.*

Simil-formaj vortoj estas **fonduso** "kapitalo destinita por aparta difinita celo": ***testamenti fonduson***, *legar fondos*; ***amortiza fonduso***, *fondo(s) de amortización*; ***la Internacia Mono-Fonduso***, *el Fondo Monetario Internacional*; **fundo** "plej profunda surfaco de kavo": ***la fundo de la maro***, *el fondo del mar*; ***funde de la koridoro***, *al fondo del pasillo*; ***ĝisfunda puri-***

***gado***, *limpieza a fondo*; kaj **fono** "efektive ebena aŭ pro malproksimeco ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas aŭ elkontrastas": ***la fono de pentraĵo***, *el fondo de un cuadro*; ***la sonora fono de filmo***, *el fondo sonoro de una película*; ***verda stelo sur blanka fono***, *una estrella verde sobre fondo blanco*; ***fon-muziko***, *música de fondo*.

**granato** estas bongusta frukto de granatujo: ***granat-suko***, *zumo de granada*; *granadina*. Pli danĝera montriĝas **grenado**, speco de malgranda man-bombo: ***ĵeti grenadon***, *lanzar una granada*; ***grenadisto***, *(soldado) granadero*. Similaj vortoj ekzistas ankaŭ majuskle: **Granado** estas *Granada*, la bela andaluza urbo, kie naskiĝis konata kaj koninda esperanto-poeto; **Grenado** estas la kariba ŝtateto *Granada*. Fine ni menciu la vorton **grenato**, mineralo uzata kiel gemo: ***grenat(kolor)a jupo***, *falda (de color) granate*.

**Noto**: Mi fuŝis mian **14an Lingvan Angulon** per stulta anglismo en la hispana. Amiko Jorge Camacho avertis min, ke la hispana *compromiso* ("convenio entre litigantes, por el cual comprometen su litigio en un tercero" kaj "obligación contraída, palabra dada, fe empeñada") kaj la esperanta **kompromiso** ("interkonsento, aranĝita dank' al reciprokaj cedoj de du kontraŭuloj pri la diskutitaĵo") NE samsignifas: la unuan oni povus esperantigi per ***(sin)devontigo***; ***engaĝ(iĝ)o***; ***devoligo***; la duan oni povus hispanigi per *transigencia*; *contemporización*; *transacción*; *solución transaccional*; *avenencia*; *arreglo*; *concesiones recíprocas*; *término medio*; *solución intermedia*. Mi pardonpetas.

# 60 Hispana Kongreso

## Loĝado

**San Javier - Santiago de la Ribera**
**(Manga del mar menor)**

La organizantoj de la kongreso ne faros rezervojn por loĝado. Tamen oni sendos al aliĝintoj, kaj eventualaj pentintoj, liston de hoteloj kun telefonnumero, proksimuma prezo, kaj ĉiuj proponitaj servoj. La hoteloj disponos la liston de kongresanoj, por aplikado de favora tarifo. Nun, por orientado, jen kelkaj nomoj de loĝejoj kun proksimuma prezo (P:):

Hoteloj

Albohera (***) Marin 29, S. Ribera. Tel. 968335914. (P: 7.500 -- 10.000).

Lido (**) Conde Campillo 1, S. Ribera. Tel. 968570 00. (P: 5.000 -- 7.500).

Hotel Madrid (*) Zarandona 18, S. Ribera. Tel. 968570504. (P: sub 5.000).

Pensión Manida (**) Muñoz 11, S Ribera. Tel. 968570011. (P: sub 5.000).

Pensión Nenico (**) Principe 8, S. Javier. Tel. 968572901. (P: sub 5.000).

Apartamentoj

AT Pagán (**) Maestre 4, S. Ribera. Tel. 968570032. (P: 5.000 -- 7.500).

Kampadejoj

Camping La Encina, Ctra. La Ribera--Los Alcázares, tel. 968570133. (P: 2.000 -- 4.000)

Post la 30 de junio, la organizantoj NE garantias loĝadon, tiuepoke ĉar la regiono plenas de turistoj. Faru vian rezervon kiel eble plej frue!

# 60a Hispana Esperanto-Kongreso

San Javier (Murcia),
22a ĝis 30a de junio 2001
Kongresejo:
Centro Cívico de San Javier
Parque Almansa

ALIĜILO N-RO......

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj ..................................................
Antaŭnomo: ..................................................
Naskiĝdato (2) .......................... HEF-numero ................
Adreso. ..................................................
.................................... Poŝtkodo ................
Urbo ......................... Telefono ....................
Retadreso ......................... Faksilo ....................

(2) Nur por statistiko


Kongreskotizoj en pesetoj: .......... ĝis la 30a de Aprilo............ poste
Kongresano ................................ 5.000 ............ 5.500
Donacon ..................................................
ENTUTE: ..................................................

Kotizu pere de BBVA, konto-numero: 0182-3203-57-0200015978
al la 60a Hispana Esperanto-Kongreso; ES-30730 San Javier (Murcia).
Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso.
**Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%**
LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.

Dato kaj subskribo ..................................................


Kongresa Sekretario: Vicente Sanchez Lumbreras; Saturno 15; ES-30730
San Javier (Murcia); Tel: 968192598; 968191243; 968183338; 968190588
Retadreso: vsal0001@almcz.pntic.mec.es

c.j.cela:
la familio
de pascual
duarte



hispana literaturo

astura
bukedo



hispana literaturo

sentempa
simfonio
poem-antologio
hispana



hispana literaturo


m. hernández,
poeto de l' popolo
poem-antologio



hispana literaturo

ana mª
matute

la stultaj
infanoj




hispana literaturo

ramón del
valle-inclán:
tirano
banderas



hispana literaturo

federico
garcía lorca:
sanga
nupto



hispana literaturo

# Hispana Literaturo

**Ĉu vi ne havas ĉiujn?**
**Jen bela donaco por eksterlanda amiko**

## Libroservo de HEF

**Apartado 119**
**ES-47080 Valladolid**
**Tel: 983-26-00-86**
**Rete: pgarrote@eurociber.es**

# Merlin: Ho! Mia kor'!

**La plej bela balado verkita en Esperanto.**

Depósito legal Z-334-90. Presejo: Gráficas Aurora